



Projekto pri **INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ EN ESPERANTO**

CURSO (voluntario) DE ESPERANTO en el Instituto de Idiomas de la Universidad de Santiago de Compostela
Con la colaboración de la **FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Proyecto de **CURSOS DE VERANO PREUNIVERSITARIOS INTERNACIONALES EN ESPERANTO**

Adreso / Dirección: Curso de Esperanto.- Instituto de Idiomas.- Praza de Mazarelos, s/n.- E-15703-Santiago de Compostela.-
Hispanio / España

Telefono kaj telefakso / Teléfono y telefax: 9.81.598005

Informilo / Boletín informativo n-ro 2.- Marto / Marzo 1991

Suplemento al nº 302 del Boletín de la Federación Española de Esperanto

(1)

Ni havas la plezuron aperigi tiun ĉi numeron 2 de la informilo pri la projekto, por prezenti la ĉefajn evolupeŝojn post la apero de la n-ro 1 (Majo 1990).

Tiu ĉi nova numero estas dissendita al la samaj personoj kaj institucioj, al kiuj ni sendis la antaŭan (vidu liston de ili en tiu n-ro 1). Pliajn ekzemplerojn de ambaŭ numeroj oni povas peti de la adreso supre indikita.

Danke al helpoj ricevitaj, la projekto jam disponas komputilan eldonsistemon -kio konsistigas bonan bazon por la laboro, ĉar tio tre faciligos la taskojn redaktajn kaj kompostajn de la studkajeroj eldonotaj por la Kursoj.

Fakte, jam tiu ĉi nova numero de la informilo estis kompostita per nia eldonekipaĵo.

Nos complace presentar este número 2 de la circular sobre el proyecto, para informar de los más importantes pasos de su desarrollo después de la aparición del nº 1 (mayo de 1991).

Este nuevo número se remite a las mismas personas e instituciones a las que remitimos el anterior (véase lista de ellas en ese nº 1). De la dirección arriba indicada pueden solicitarse nuevos ejemplares de ambos números.

Gracias a ayudas recibidas dispone ya el proyecto de un sistema informático de autoedición -lo que constituye buena base para el trabajo, pues facilitará grandemente las tareas de redacción y composición de los cuadernos de estudio a editar para los Cursos.

De hecho, ya este nuevo número de la circular fue compuesto con nuestro equipo de edición.

(2)

En la informilo n-ro 1 ni prezentis faksimilaĵojn de la principaj apogleteroj ricevitaj de la Direktoro de la Kabineto (-Konsilantaro) de la Hispana Ministro pri Edukado kaj Scienco, ankaŭ de la Universitato de Santiago de Compostela (tra la Direktoro de ties Instituto por Lingvoj) kaj de la Ĝenerala Direktoro por Prilingva Politiko de la Aŭtonoma Komunumo Galegio. El apogesprimoj poste ricevitaj ni prezentas faksimile sur la sekvanta paĝo jenan galegalingvan leteron de la Urbestro de Santiago de Compostelo, kiun ni tradukas en Esperanton:

Informite pri la projekto pri Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto, kiun vi organizas ĉe la Instituto por Lingvoj de la Kompostela Universitato, endas prezenti al vi la simpation kaj apogon de la Urbeŝtraro, kiun mi prezidas, al tiu iniciato. La dato elektita, en la Jakoba Jaro de 1993, ŝajnas al ni speciale fortuna, pro la kongruenco inter la celoj sur kiuj via projekto radikas, kaj la diversaj instituciaj programoj kun internacia amplekso por la memorfesto de tiu jaro, substrekan- te la signifon de la Jakoba Vojo en la nova Eŭropo sen landlimoj.- Kun la propono de nia kunlabo- rado, ricevu mian sinceran saluton.

La "Jakoba Vojo" konsistigis en mezepoko la plej gran- valon ligitan (religian, kulturalan, ekonomian) inter (norda) His- panio kaj la cetero de Eŭropo, ĉefe por pilgrimado al la (kredata) tombo de la apostolo Jakobo (Zebedeo), en la katedrala urbo Santiago de Compostela.

En la circular nº 1 presentamos en facsimil las cartas que de apoyo en principio recibimos del Direc- tor del Gabinete del Ministro Español de Educación y Ciencia, también de la Universidad de Santiago de Compostela (a través del Director de su Instituto de Idiomas) y del Director General de Política Lingüística de la Comunidad Autónoma de Galicia. De las expresiones de apoyo recibidas posteriormente presenta- mos aquí también en facsimil la carta en lengua gale- ga del Alcalde de Santiago de Compostela, que traducimos al Esperanto:

El "Camino de Santiago" constituyó en la Edad Media el más importante lazo de unión (religiosa, cultural, econó- mica) entre (el norte de) España y el resto de Europa, es- pecialmente para peregrinación a la (creída como) tumba del Apóstol Santiago el Mayor, en la ciudad catedralicia de Santiago de Compostela.

Jam de pluraj jaroj okazas oficialaj aranĝoj por revigligi tiun vojon por la nuntempa vivo. Plej grava el ili estas la "Patronaro de la Jakoba Vojo", kiun sub prezido de la hispanaj Reĝo kaj Cefministro oni estigos en la tujaj monatoj. [La nomo "Santiago" (elp. santiago) venas de Sanct Yago (= Sankta Jakobo). La esprimo "de Compostela" (elp. kompostela) etimologie signifas "de stelkampoj". "Jakoba Vojo" estas ankaŭ alia nomo por la Lakta Vojo].



Alcalde de Santiago de Compostela
Xerardo Estévez Fernández

4/III/91

Sr. Don ANTONIO ALONSO NUÑEZ
A Rosa, n° 26-5° C
C I D A D E

Moi Sr. meu:

Informado do proxecto de "Cursos de Verano Preuniversitarios Internacionais de Esperanto", que V. promove no seo do Instituto de Idiomas da Universidade compostelana, cúpreme manifestarlle a simpatía e apoio do Concello que presido á citada iniciativa. A data elexida, no ano xacobeo de 1993, parécenos particularmente afortunada, habida conta da concordancia entre os propósitos que informan o seu proxecto e os diversos programas institucionais de alcance internacional para a conmemoración dese ano, sulifando a significación do Camiño de Santiago na nova Europa sin fronteiras.

saúdo,

Co ofrecemento da nosa cooperación, reciba un atento

(3)

La principa aprobo al la projekto flanke de la diversnivelaĵ hispanaj institucioj estas do certigita. Tial venas nun la fazo, en kiu la fakuloj uzantaj Esperanton, kaj iliaj institucioj -ankaŭ aliaj institucioj al kiuj tiuj personoj rilatas kaj/aŭ al kiuj ili informos pri la projekto- eventuale decida pri sia ebla helpo kaj/aŭ kunlaboro, ĉar tio estas la nepra kondiĉo por ke la komencaj apogantoj povus studi, ĉu la projekto meritas pluan kaj pli gravan atenton.

Por la malvolvo de la citita fazo, demarŝoj estas jam faritaj por oficiala prezento de la projekto en jenaj tri aranĝoj:

- 51a Hispana Kongreso de Esperanto, en La Laguna (Kanariaj Insuloj), julio 1991.
- 76a Internacia Kongreso de Esperanto, en Bergen (Norvegio), julio-aŭgusto 1991.
- 25a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, en Voss (Norvegio), aŭgusto 1991.

Eroj de tiu prezento estas la jenaj (vidu punkton 3 de la informilo n-ro 1): Prezento de presprovaĵoj de la du unuaj studkajeroj por la Kursoj, plus provaĵo de la sonkasedo akompananta la unuan kajeron; decidoj pri kalendaro kaj ejoj; oficiala starigo de redaktoskipoj; starigo de regularo por funkciado de la projekto; plano por venigo de studentoj kaj profesoroj al la

Hace ya varios años tienen lugar trámites oficiales para revitalizar ese camino para la vida actual. El más importante de ellos es el "Patronato del Camino de Santiago" que bajo la presidencia del Rey de España y del Primer Ministro se creará en los meses inmediatos. [El nombre "Santiago" procede de Sanct Yago (= San Jacobo). La expresión "de Compostela" significa etimológicamente "del campo de la estrella". "Camino de Santiago" es también otra denominación de la Vía Láctea].

Está por tanto confirmado el apoyo en principio al proyecto por parte de las instituciones españolas de diversos niveles. Se llega por eso a la fase en la que los técnicos y especialistas usuarios del Esperanto y sus instituciones -y también otras instituciones con las que esas personas se relacionen y/o a las que informen del proyecto- eventualmente decidan sobre su posible ayuda y/o colaboración, puesto que sería la condición indispensable para que quienes ya iniciaron su apoyo pudiesen estudiar si el proyecto merece atención ulterior y más importante.

Para desarrollar la fase citada se han hecho ya trámites para la presentación oficial del proyecto en los tres congresos siguientes:

- 51º Congreso Español de Esperanto, en La Laguna (Islas Canarias), julio de 1991.
- 76º Congreso Internacional de Esperanto, en Bergen (Noruega), julio-agosto de 1991.
- 25º Conferencia de la Liga Internacional de Maestros Esperantistas, en Voss (Noruega), agosto de 1991.

Partes de esa presentación son las siguientes (véase el punto 3 de la circular n° 1): Presentación de las pruebas de imprenta de los dos primeros cuadernos de estudio para los Cursos, junto con la prueba de la cassette magnetofónica que acompañará al primer cuaderno; decidir sobre calendario y locales; constitución oficial de los equipos redactores; esta-

Kursoj; kunlaborado de aliaj institucioj; financado; diplomaro, kontroloj kaj garantioj, ktp. (Ni planas tuj poste sciigi per informilo n-ro 3 pri la rezultoj atingitaj en la cititaj kongresoj).

becimiento de reglamento para el funcionamiento del proyecto; plan para la venida de alumnos y profesores a los Cursos; colaboración de otras instituciones; financiación; diplomatura; controles y garantías, etc. (Proyectamos informar inmediatamente después por medio de la circular nº 3 sobre los resultados alcanzados en los congresos citados).

(4)

Jen specimenaj tekstoj el la studkajeroj jam nun prilaborataj por la Kursoj (el kiuj la du unuaj baldaŭ troviĝos en fazo de presprovaĵoj, kune kun la sonkasedo akompanonta la unuan el ili):


Siguen como muestra algunos textos de los cuadernos de estudio ya en elaboración para los Cursos (de los cuales los dos primeros estarán pronto en fase de pruebas de imprenta, junto con la cassette magnetofónica que acompañará al primero de ellos):

Sur la spuroj de Federico García Lorca. Aŭtoro: Ing. Miguel Fernández (Hispanio), (tradukinto de la Lorcaaj verkoj *Sanga Nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba*). Kun traduko de pluraj poemoj kaj andaluzaj popolkantoj, riĉe ilustrita, kaj kun akompana sonkasedo en kiu la aŭtoro deklamas la poemojn, kantas la kantojn (harmonizitajn de Lorca mem), ktp:

1) *Tras las huellas de Federico García Lorca.* Autor: Ing. Miguel Fernández (España), (traductor al Esperanto de las obras lorquianas *Bodas de Sangre* y *La casa de Bernarda Alba*). Con traducción de varios poemas y canciones populares andaluces, ricamente ilustrada, y con una cassette magnetofónica aneja en la que el autor declama los poemas, canta las canciones (armonizadas por el propio Lorca), etc.

... La Barako ruliĝas, ruliĝadas de loko al loko inter kanzonoj kaj ridoj, inter blagoj kaj gajo. Federiko sparkas per la tipe andaluza sprito, subite prenas la gitaron kaj plengorge interpretas la sinkopan ritmon de la Sevilaj kantoj el la 18a jarcento, de li harmonizitaj:

Vivu Sevilolo!
Sevilaninoj portas
sur la mantilo
anonceton dirantan:
Vivu Sevilolo!



Desegnaĵo de Salvador Dalí en la revuo de la Restadejo (1926), ilustranta libron de hispanaj kantoj

Inter la celoj de la Kursoj troviĝas la studado de literaturaj aŭtoroj kaj naciaj literaturoj surbaze de la tradukoj jam publikigitaj en Esperanto. Aldone al tio, estos tre bonvenaj enkondukaj esoj analogaj al tiu ĉi pri Lorca -kiun ni opinias modela, i.a. pro la grava rolo kiu en ĝi ludas la viva parolo kaj la kantado, kaj ne nur la skribaĵo.


Entre las finalidades de los Cursos se encuentra el estudio de autores literarios y de literaturas nacionales, basándose en las traducciones ya publicadas en Esperanto. En adición a esto serán muy bienvenidos ensayos análogos a este sobre Lorca -que tenemos por modelo, entre otras razones por el importante papel que en él tiene la palabra viva y el canto, y no tan sólo la escritura.

2) *Elemente pri paralelismo.* Redaktoro: Lic. Antonio Alonso (Hispanio). Jen la ĉapitroindekso: lomo pri naiva realismo kaj sciencoj. Paralelismo laŭ Eŭklido (rekta ĉerpajo el la Eŭklidaj *Elementoj*). Ekzegezo pri la Eŭklidaj *Elementoj*. Provoj venigi la 5an postulaton inter la teoremojn. La unuaj esploroj pri t.n. "neeŭklidaj geometrioj". Modernaj poluroj al la Eŭklida verko;

2) (*Hablado*) *Elementalmente sobre paralelismo.* Redactor: Lic. Antonio Alonso (España). He aquí el índice de los capítulos: Algo sobre el realismo ingenuo y las ciencias. El paralelismo según Euclides (tomado directamente de los *Elementos* euclidianos). Exégesis de los *Elementos* euclidianos. Los intentos de pasar el 5º postulado a teorema. Las primeras investigaciones sobre las llamadas "geometrías no euclidianas". Pulimentos modernos a la obra de Euclides.

kompletaj postulataroj por ĝi (ekzemploj per tri diversnivelaj sistemoj). La baza problemo pri paralelismo, laŭ plej formala kaj minimuma vidpunkto. Strukturmodeloj kun ecoj eŭklidaj aŭ neeŭklidaj, lom plie pri naŭva realismo kaj sciencoj.

Jen ekzemplo pri la fakta teksto kaj (abundaj) grafikaj:



1.p1) *Sur segmento AB donita, konstrui egallateran trigonon.*
Kun centro A kaj radiuso AB desegnu la cirkonferencon BGD (laŭ P3). Kun centro B kaj radiuso BA desegnu la cirkonferencon AGE. De G, intersekca punkto de la du cirkonferencoj, streku la segmentojn GA kaj GB (laŭ P1).

Nu, ni havas jam pri longoj: $AB = BA$, $AG = AB$ (laŭ D15), kaj, analoge, $BG = BA$. Nun (laŭ K1), ankaŭ $GA = GB$. Ni tial fine venas al $GA = AB = BG$, kaj do al egallatera trigono ABG.

3) *ABC de la Eŭropa Komunumo. Enkonduko en la eŭropan juron.* Aŭtorino: Prof. Rafaela Uruña (Hispanio).

3) *ABC de la Comunidad Europea. Introducción al derecho europeo.* Autora: Prof. Rafaela Uruña (España).

Post la dua mondmilito, la funkciado de ŝtatoj kaj la politika vivo de la eŭropaj landoj kuŝis nur sur la respektivaj konstitucioj kaj la naciaj leĝoj. Tiuj ĉi fiksas en la demokratiaj landoj la regulojn, iujn devis respekti la civitanoj, la politikaj partioj kaj la ŝtato mem.



OBJEKTIVO '92:
EŬROPO SEN LANDLIMOJ!!



La unua ŝtono en la konstruado de la Eŭropa Komunumo (EK) estis la deklaro de Robert Schumann, Ministro pri Eksteraj Rilatoj de Francio, la 9-an de majo 1950, en kiu li eldiris, ke la unuiĝo de Eŭropo ne fariĝos rapide, sed iom post iom, per konkretaj agoj, kreante por tiu celo solidarecon inter la popoloj. Li, kune kun Jean Monnet, prezentis planon por unuigi la eŭropan industrion de karbo kaj ŝtalo, historia iniciato favore al "Eŭropo organizita kaj vivanta".

Post la subskribo de la traktatoj kreantaj la EKn, la jura ordo kiu ĝin strukturigas estas jam integra parto de nia eŭropa realaĵo. Ĉiujare la komunumaj traktatoj originas milojn da decidoj rekte influantaj sur la ŝtatojn kaj eĉ sur la civitanojn, tiel ke la eŭropanoj ne plu estas civitanoj nur de sia lando, sed ankaŭ civitanoj de la Eŭropa Komunumo. De tiu ĉi fakto ŝprucas la grava bezono, ke tiuj novtipaj civitanoj tenadu sin bone informataj pri siaj rajtoj kaj devoj, ĉar la komunumaj decidoj rekte influas ilin.

Elementa kurso pri astronomio por diletantoj. Redaktoro: Dip. David Galadí (Hispanio). Kun abundaj ilustraĵoj.

4) *Curso elemental de astronomía para aficionados.* Redactor: Dip. David Galadí (España). Con abundantes ilustraciones.

Kiel ĉiuj scias, *teleskopo* estas optika sistemo, kiu utilas por pligrandigi la ŝajnajn dimensiojn de (tre) malproksimaj objektoj.




A) Fundamentaj partoj de teleskopo. Ĉiun teleskopon konsistigas du fundamentaj elementoj: *objektivo kaj okulario*.

La (larĝa) objektivo kolektas la lumon el la observata (tre malproksima) objekto (tial la nomo *objektivo*), kaj koncentras ĝin en punkton nomatan *fokuso*. La distanco inter objektivo kaj fokuso nomiĝas *fokUSDistanco*. La teleskopaj objektivoj povas esti aŭ lensaj aŭ konkavspegulaj.

La bildo de la objekto formiĝanta ĉe la fokuso estas tre malgranda, tamen tre brila pro la koncentriĝo en ĝin de la tuta lumkvanto kaptita de la objektivo. Nu, la dua elemento de la teleskopo, nome la okulario, havas la taskon, el tiu unua bildo formi duan bildon, multe pli grandan, kaj tamen ankoraŭ adekvate brilan por (tre) bona observado fare de la homa okulo (aŭ de fotokameroj aŭ aliaj aparatoj). La okulario (tiel nomata ĉar al ĝi oni apudigas la okulon por rigardado), konsistas ĉiukaze el unu aŭ pluraj lensoj. Samkiel ĉiuj lensoj kaj optikaj speguloj, ankaŭ okulario havas fokusojn, kaj tial ankaŭ fokUSDistancon.

5) *Baza statistika metodaro*. Unua kontribuajo fare de OProf. Hans-Dietrich Quednau (Germanio).

5) *Métodos estadísticos básicos*. Primera contribución por el OProf. Hans-Dietrich Quednau (Alemania).



PRF de BIN (25, 0.45)

Ni estas nun konstruontaj nian teston tiamaniere, ke ĝi plenumu la postulon de maksimume 5%a probablo de erara malakcepto. Por tio ni kalkulas la *malakceptigan adedon* (m.a.a.). Ĝi estas la probablo sub H_0 por tio, ke oni ricevas test-adedon, kiu estas same aŭ eĉ pli malprobabla kiom la fakte observita, kaj kiu samtempe estas pli probabla sub H_1 (kondiĉe ke la testrezulto ne estas eĉ malpli akordigebla kun H_1 ol kun H_0 , vidu malsupre la situacion ĉe "unufanka alternativ-hipotezo"). (Ĉar la m.a.a. estas la sumo de la probabloj en la vosto de la distribuo-funkcio, oni nomas ĝin ankaŭ "vosta probablo"). Se en nia ekzemplo ni observintus $k = 6$, tiam la m.a.a. estus $P(k \leq 6 \text{ aŭ } k \geq 17) = P(0, \dots, 6) + P(17, \dots, 25) = 0,03 + 0,01 = 0,04 \dots$

6) *Kemia nomenklatur*. Surbaze de kemio-libro, tradukita en Esperanton fare de fakuloj el naŭ landoj, baldaŭ publikigota, kaj kies mikrofilmoj estis senditaj al nia projekto de Ing. R. Kent Jones, Komitatestro pri Eduko de la Esperanto-Societo de Chicago. (Tiu libro provizos materialon por du aŭ tri kajeroj de la Kursoj).

6) *Nomenclatura química*. Basándose en un libro de química traducido al Esperanto por especialistas de nueve países, de pronta publicación, y cuyos microfilmes fueron enviados al proyecto por el Ing. R. Kent Jones, Director del Comité sobre Educación de la Sociedad Esperantista de Chicago. (Este libro suministrará material para dos o tres cuadernos de los Cursos).


(En la kajero oni prezentas la nomenklaturajn regulojn, kaj ankaŭ, sisteme, grandan kvanton de formuloj en unu kolono, kaj paralele la respektivajn nomojn en alia, tiel ke kovrante jen unu kolonon, jen la alian, oni povas facile praktiki ambaŭsencan formuladon. Jen ekzemploj el tiu dukolona aranĝo):

(En el cuaderno se presentan las reglas de nomenclatura y también, sistemáticamente, un gran número de fórmulas en una columna, y paralelamente en otra los nombres respectivos, de suerte que tapando una u otra de las columnas se puede practicar fácilmente la formulación en ambos sentidos. He aquí ejemplos de ese arreglo en dos columnas):

kalia dikromato



2-(para-aminobenzenosulfonamido)-tiazolo
(mallonge: sulfatiazolo)



Redaktis kaj respondecas:

Gvidanto de la (libervola) Esperanto-Kurso ĉe la Instituto por Lingvoj de la Universitato de Santiago de Compostela (Hispanio). Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Adjunkto de la Akademio Internacia de la Sciencoj (San Marino).

Licenciulo pri Matematiko. Diplomito pri Komerca Fako. Statistikisto.

Redactor responsable:

Antonio Alonso Núñez

Instructor del Curso (voluntario) de Esperanto en el Instituto de Idiomas de la Universidad de Santiago de Compostela (España). Presidente de la Federación Española de Esperanto. Adjunto de la Academia Internacional de las Ciencias (San Marino).

Licenciado en Matemáticas. Profesor Mercantil. Estadístico.

La ortografio de Esperanto estas tute regula: al ĉiu fonemo respondas po unu litero, kaj reciproke.

Ekzistas entute la kvin vokaloj *a, e, i, o, u*, kaj ties prononcado estas tia sama, kiel en la lingvoj hispana, vaska, serbo-kroata, ĉeĥa kaj aliaj lingvoj.

Unusilabaj vortoj estas principe senakcentaj. Ĉiuj plursilabaj vortoj havas akcenton sur la antaŭlasta vokalo.

Se la sonoj *i, u* konsistigas la malfortan parton de diftongo, ili estas skribataj respektive *j, ŭ*. Tiuj ĉi sonoj ne rolas por la akcento-regulo.

Plejparto el la konsonantoj reprezentas la samajn sonojn, kiel en la Internacia Fonetika Alfabeto.

Eblas eliziado de la vokalo en la (sola kaj nevaria) artikolo *la* per apogo sur apuda vokalo (*de la, de l'*; *la eniro, l' eniro*) kaj de la vokalo *o* en fino de vorto (*eniro, enir'*). En ĉi lasta kazo la akcento falas sur tiun saman vokalon, kiu ĝin havus sen elizio.

La ortografía del Esperanto es totalmente regular: a cada fonema le corresponde una letra, y recíprocamente.

Existen en total las cinco vocales *a, e, i, o, u*, y su pronunciación es la misma del castellano, vasco, servo-croata, checo y otras lenguas.

Las palabras monosílabas son en principio átonas. Todas las polisílabas tienen el acento sobre la penúltima vocal.

Si los sonidos *i, u* constituyen la parte débil de un diptongo se escriben respectivamente *j, ŭ*. Estos sonidos no se tienen en cuenta para la regla del acento.

La mayor parte de las consonantes representan el mismo sonido que en el Alfabeto Fonético Internacional.

Es posible la elisión de la vocal en el artículo (único e invariable) *la* con apoyo en vocal inmediata (*de la, de l'*; *la eniro, l' eniro*) y de la vocal *o* en fin de palabra (*eniro, enir'*). En este último caso el acento cae sobre la misma vocal que lo llevaría si no hubiese elisión.

Kompostis / Compuso: K+E (Santiago de C.)
Filmis / Filmó: TOU (Valencia)
Presis / Imprimió: VELOGRAF (Santiago de C.)
Eldonkvanto / Tirada: 2000
Laŭlega deponaĵo / Dep. Legal: C-822-1991